

ILEI raportas

2014-10-15

Raportas la prezidanto pri ~ trimonata agado 2014-07-17 - 2014-10-15

Enkonduka rimarko

Foje ni devas raporti de la unua de januaro ĝis la 31^a de decembro. Foje ni devas raporti de Konferenco al Konferenco, do de julio al julio. Pro tio mi raportis kaj raportos ĉiun trian monaton. Tiel mi povos puzzle kunmeti la bezonatajn raportojn laŭ la bezono.

Revuoj

IPR plu evoluas, laŭ mia konstato en ordo. Ni aldonis kvaran koloran paĝon. Mi provas aldoni fotojn por gajigi la aspekton. Por mi estas tre grava aspekto de mia laboro, mi laboras por riĉa enhavo diversa kaj lertiga, lingva korektado. Mi aŭdas pozitivajn komentojn, laŭdojn. La redaktoro Jozefo Nemeth tre efike laboras.

JA fartas bone, laŭ mia konstato en ordo. Mi estas nun unu el la korektantoj. Mi aŭdas pozitivajn komentojn, laŭdojn. La redaktoro Stano Marcek tre efike laboras.

47a Konferenco 2014 en Urugvajo

Mi alvenis tri tagojn antaŭ la komenco kaj tiel povis helpi en la lastaj preparoj.

Ni havis neformalan kunvenon sabate posttagmeze antaŭ nia kutima frandvespero; tio donis okazon libere diskuti pri nova agado de ILEI: instigo al konservado de eldonaĵoj "Ni Savu Niajn Semojn" (NSNS en la stilo de SOS). Konkretaj proponoj aperis.

Ĉio iris glate, homoj estis kontentaj, pluvojaĝis gajaj. Estis kelkaj mankoj kaj paneetoj: ekzemple la programo por ne-komitatoj prepariĝis iom malfrue kaj la anoncoj priaj venis lastmomente. Savis ĝin la streboj de Ana Montesinos de Gomis, komisiito pri tiu Konferenco. La Komitato laboris dum 8 horoj entute, efike, ĝi povis trakti la longan tagordon ĝis la fino. Se ni konsideras la tuton, la Konferenco estis sukcesa.

Urugvaja membro de Internacia Asocio de Edukistoj al la Paco (IAEP) vizitis nian Konferencon plurfoje. Mi prezidas la svisan sekcion de IAEP.

Pri la Rezolucio de la Konferenco (kiu plurfoje mencias Uneskon) : mi alportis ĝin al la persono, kiu akceptis min en Parizo en la sidejo de Unesko la 6an de oktobro. Tiu persono indikis al mi, ke tiaj dokumentoj iru rekte al la Ĝenerala Direktorino. Tion mi faris la 8an de oktobro.

Intervjuo de mi pri la Konferenco aperis en paĝo 177 de la septembra numero de la revuo ESPERANTO.

48a Konferenco 2015 en Belgio

Ĝi okazos en Oostende, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. Agema loka grupo eklaboris kuraĝe kaj efike. Nia estrarano pri Konferencoj Radojica Petrovic estis surloke por

kunlabori en aprilo kaj denove estos en oktobro. Feliĉe li havas grandan sperton pri tiaj eventoj.

Venontaj Konferencoj

Radojica Petrovic verkis demandaron en formo de konkurso por ebligi al ĉiuj sekcioj aŭ aliaj stabloj kandidatiĝi por akcepti niajn venontajn Konferencojn, ĉefe la 49an en la jaro 2016. Tiu dokumento estis vaste disvastigita. Ni estas en atendo pri la rezulto de tiu nova strategio.

Vivo de la Ligo

Membroprizorgado estas giganta tasko de nia vic-sekretario Magdalena Fejficova. Kontroli la listojn, sendi etiketojn al Flandra Esperanto Ligo (FEL), kiu printas IPR-n, jen ŝia tasko. La kasisto prilaboras la saman liston per indiko pri pagoj. Pluraj sekcioj ne ankoraŭ pagis por la jaro 2014, admoni endas. Ni devos fari tion ankoraŭ pli severe, ĉar la paĝoj devus okazi antaŭ la fino de marto!

Du estraraj voĉdonoj retaj okazis.

19an, 20an, 21an kaj 22an de septembro okazis parta estrarkunveno en Herzberg kun partopreno de Zsofia Korody, Fejfi kaj mi. Ni povis atente tralegi la membroliston, fari bezonatajn modifojn, diskuti pri multaj temoj el plurpaĝa listo. El tio venis kelkaj punktoj traktendaj per estraraj retaj voĉdonoj.

En rilato kun la Tago de Paco (21an de sept.) kaj la Tago de la Instruistoj (5an de okt.) ILEI sendis instigan tekston al siaj membroj kaj sekcioj.

Mi sendis salutmesaĝojn al 3 organizantoj de eventoj, kursoj, kongresoj.

En Montevideo elektiĝis nova Elekta Komisiono, ĉar 2015 estos por la estraro elektojaro. Elektiĝis Jenifer Bishop, Aurora Bute, Ana Montesinos de Gomis. En septembro Jenifer demisiis pro sanproblemoj. Nuntempe okazas esploroj por reatingi la laŭstatutan nombron de tri membroj.

La duan de oktobro mi veturis al Parizo kaj povis deponi en la sidejo de UFE grandan kvanton de dulingvaj varbiloj pri ILEI en la angla kaj eo por uzo en Unesko.

Premio Mauro La Torre

Laŭ propono de la familio La Torre prezentiĝas eblo por fakuloj, esploristoj, kandidatiĝi pri tiu premio. La organizantoj estas la familio La Torre kaj ILEI. La estraro de ILEI diskutis pri regularo kaj voĉdonis. Nun la dokumento aperas sur nia retejo kaj anonco aperis en la revuo ESPERANTO en paĝo 211 de la numero de oktobro.

Kresko

La Komitato voĉdonis pri akcepto de 4 novaj sekcioj : Bulgario, Hispanio, Irano, Kongo RD. Ŝajnas, ke tio estas rekordo. La Konferenco kaj UK en Sud-Ameriko donis eblon konatiĝi kun homoj kaj trovi novajn kontaktpersonojn. Tio okazis por Argentino kaj Nikaragvo. Do ni vidas grandan intereson tra la mondo labori kun ILEI, por ILEI. Tio estas tre pozitiva aspekto. Novaj individuaj membroj aliĝis okaze de la Konferenco kaj de UK.

Retejoj

www.ilei.info funkcias. Ĝi estas nia enmovada vektoro. Aldoniĝas novaj rubrikoj, dokumentoj. Mi sekvas tion tre proksime, ĉar tio estas iel nia “nomkarto”. Jozefo Nemeth zorgas pri ĝi kaj plenumas miajn petojn ĉiam post malpli ol 24 horoj.

Pri www.ilei-mondo.info estas nun laboranta fakulo. Unue la plurlingva retejo restos la sama, kun reta tre detala aliĝilo por la TTK (Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto). Pli poste venos reordigado pli moderna kaj facila por la uzantoj. Kompreneble la aliĝilo povos adaptiĝi al aliaj eventoj kiel al niaj ĉiujaraj Konferencoj.

Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto (TTK), 13n ĝis 16an de majo 2015 en Svislando

La Kolokva Organiza Komitato konsistas el 4 personoj pro la aniĝo de Dietrich Weidmann, kunprezidanto de Svisa Esperanto Societo (SES). La celaro pretas.

La Komitatanoj de ILEI kaj de UEA ricevis afiŝon pri tiu evento. Ni printis cent afiŝojn en Montevideo.

Ni komencis traduki al Eo bazajn priskribojn de diversaj muzeoj en la regiono. Tio estas pozitiva kromefiko de la Kolokvo.

MI verkis tri artikolojn por la revuo MONATO por prezenti Svislandon kaj la du kolokvajn urbojn; ili aperos dum la vintro kaj fokusos la atenton al mia etega lando.

Mi esploris pri restoracioj kaj hoteloj. Buĝeto pretas. Mi kontaktis 21 eblajn sponsorojn. La paĝo 190 de la septembra numero de la revuo ESPERANTO devus instigi la firmaon MOVADO subteni la TTK.

La 28an de aŭgusto Dietrich Weidmann povis filmi dum 3 horoj por varba agado por aŭtomarko kaj elektis la lokojn de la TTK kaj prezentis la eventon. La filmeto aperas sur la Reto. <https://www.youtube.com/watch?v=LT9sMY6-zFk>

Kontaktoj kun movadaj establoj

UK ebligis havi budon pri ILEI kaj informi nian publikon. Ni partoprenis la “Movadan Foiiron”. Kunsido pri ILEI okazis. La kutima Tago de la Lernejo akiris novan nomon “Tago de Lernado” kaj altiris aŭskultantojn pro sia riĉa programo starigita de Marija Belosevic. Por nia Konferenco kaj UK en du hispanlingvaj landoj ILEI printis en Montevideo mil dulingvajn varbilojn, kiujn ni plu uzos ĉe Unesko en Parizo.

Kontaktoj kun UEA kaj TEJO estas oftaj.

Diskuto kun Katalin Kovats (www.edukado.net) povis okazi en Besançon, Francio, kie ŝi ferias kaj kien mi povas iri facile per trajno (80km).

UEA metis siajn prioritatojn en la seminarioj pri Aktivula Maturigo kaj pro tio ILEI ricevos malpli da "Pedagogia Kontribuo". Tiu decido de la Komitato de UEA kompreneble ne ĝojigas nin.

Granda atento iris al la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM en Poznan, Pollando. Venis sukceso, ĉar aliĝis 26 gestudentoj por la trijaraj studoj.

La propono de samtempa kongresumado en 2015 el Esperantotur el Bydgoszcz estis nuligita pro la forpaso de Andreo Grzebowski.

Kontakto kun ekstermovadaj establoj

Unesko. La partopreno de Sinjorino Brito, direktorino de Unesko por Sud-Ameriko pri sciencoj kaj por Argentino, Urugvajo kaj Paragvajo certe estis grava evento menciinda. La prezento de la eventoj de 1954 okaze de la malfermo de la Konferenco kaj okaze de du enkondukaj prelegoj substrekis nian 60jaran kunlaboron kun tiu establo. La enhavo de la Rezolucio kaj la decido de la Komitato prioritatigi niajn ligojn al tiu instanco metas plian akcenton al tio. Mi vizitis la centran sidejon la 6an de oktobro kaj ricevis informojn pri ebla kunlaboro inter NeRegistaraj Organizoj (NRO) kaj Unesko laŭ nova regularo de 2012. Pliaj informoj sekvos.

Eŭropa Unio. ILEI proponis novan projekton kadre de la programo "Erasmus plus", kiu ne estis akceptita. Tio ne dependas de iu malbona propono, sed de la kvanto de kandidatiĝoj en Nederlando, nia jura sidejo. En la sama kadro aliaj projektoj estis akceptitaj kaj esperantistoj povas vojaĝi kaj ion partopreni kun repago de vojaĝkostoj fare de EU.

Kostoj de tiuj reprezentadoj. La problemo pri la prezo de tiaj partoprenoj ne estas solvita. Plej ofte ni partoprenas aŭ pagante mem niajn kostojn, aŭ uzante okazon, ĉar iu estas en la loko de la kongreso, aŭ ni sendas iun personon... iom amatora organizado. Ĉar mankas mono. Dum la jaro 2013-07 ĝis 2014-07 la delegitoj de ILEI elspezis 1064 EUR kaj ILEI repagis 235. El tio oni povas kalkuli, ke krom donaco de tempo kaj energio niaj delegitoj donacis 829 EUR por veturi al Parizo Unesko ekzemple. Detala dokumento pri tio ekzistas. Ni ne parolas pri ia rekompenco aŭ salajro, nur pri eventuala parta repago de vojaĝkostoj kaj restadkostoj.

Rimarko

Tiu fakto ne estas nova por mi: mi ricevis plurajn sugestoj en la stilo "ILEI devas fari tion kaj jenon...!". Nun post unu jaro homoj vidas nian agadon, nian energion, kaj provas puŝi al niajn taskojn... Kompreneble ni esploras pri tiuj proponoj, sed ni ne povas ĉion fari. Ni povas kunordigi, ni povas kontroli iun verkon antaŭ aperigo kaj publikigi niajn pozitivajn komentojn, tamen ni ne povas transpreni ĉiujn taskojn. Ni estus feliĉaj, se pli da homoj pretus aktive kunlabori kaj ne nur instigi, ke ILEI faru.

2014-10-15

Mireille Grosjean

Prez de ILEI